ADORU 362



2. Vibrante lumo sin deĵetas
sur ilin en langeca flam',
ke la paroloj nun impetas,
fervoras proksimula am'.

3. Fremd-lingve ili jen parolas,
l' amasoj tremas de ekscit'.
Ebriaj ŝajne ili bolas,
trinkigis ilin la Spirit'.

4. Ni petas Vin, fontan' de l' bonoj,
vizaĝ-al-tere antaŭ Vi:
Sin verŝu la Spiritaj donoj
per Via graco super ni.

5. Al Dio Patro estu gloro
kaj al la Fil', levinta sin
el Sia tombo, kaj honoro
al Sankta la Spirit' sen fin'.
(Amen.)

BEATA NOBIS GAUDIA • M (St. Clement): Clement Cotterill Scholefield 1874, Unisono 133, HAM 33, HON 475, LBW 274, EG 266, RG 605, EM 640 • latina T: antaŭ 900 • E: Guido Holz 1986*, 4a strofo: Albrecht Kronenberger 1999